

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

La Patriotisma Movado de la Ĉina Studentaro
Batalo por Koreaĵ Infanoj
Leviĝo de Li Aĵe en la Agrara Reformo
La Batalo de 2,200,000 Kamparanoj Kontraŭ Naturo
Sur la Mongolia Stepo
La Plej Forta Voĉo de la Paco

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 5
MAJ. 1951

Manifestacio de Unueco, Felice kaj Forteco

Se la lastjara Majtago estis la unua fojo en historio, en kiu la ĉinaj laborantaj popolanoj celebris sian festtagon en libereco kaj ĝojo, sub la protekto de sia propra registaro, la ĉjara Majtago jam estis manifestacio de unueco, felice kaj forteco de 475 milionoj da popolanoj kunigitaj en defendo de paco kun ĉiuj popoloj kiuj serĉas pacon kaj volonte ĝin defendas.

En la festtago, pli ol 600,000 civitanoj, po 70 ŝultre-ĉe-ŝultre, marŝis aŭ dancis huraante tra la granda placo antaŭ la Pordego de Ĉiela Paco (天安門) dum ses horoj.

La urbestro de Pekino, Peng Ĉen (彭真) anoncis la komencon de la parado: "Ni estas ĉi tie por celebri la grandajn venkojn de la ĉinaj popolaj volontuloj kaj la Korea Popola Armeo sur la fronto, kaj por celebri la kreskon de la monda tendaro de paco kaj demokratio kun Sovetunio ĉe la kapo. Ni estas ĉi tie por opozicii la Usonan planon rearmi Japanion kaj subskribi apartan pactraktaton, por opozicii la Usonan agreson, por helpi Koreion kaj defendi niajn hejmojn kaj pacon en Azio kaj la mondo."

Kiam la lasta muĝo de la artileriaj salvoj kaj tonoj de la Nacia Himno kaj Internacio ĉesis, amaso de ruĝa silko komencis moviĝi en la placon kaj poste venis gigantaj portretoj de Prezidanto Maŭ Ze-tung, Generalissimo Stalin kaj aliaj popolgvidantoj el multaj landoj. Miloj da junuloj en kolorplenaj kostumoj marŝis paŝon post paŝo laŭ takto de la tamburdanco, ĉiuj kun talitamburoj aŭ cimbaloj. La konstanta tondrado de tamburoj dronigis la aplaŭdojn kiuj ilin renkontis.

Ili, kaj maro de Pekinaj civitanoj kiuj ilin sekvis, estis salutataj de Prezidanto Maŭ Ze-tung, Viceprezidantoj Ĉu Teh (朱德) Liu Ŝaŭ-ĉi (劉少奇) kaj Li Ki-sen (李濟深) Ĉefministro Ĉou En-laj (周恩來) kaj aliaj gvidantoj de la Registaro kaj popolaj organizoj. Kun ili estis la Panĉen Lama (班禪喇嘛), kaj Ngapo (阿沛) estro de la Tibeta Delegacio.

Sur la rigardantaj tribunoj estis vizitantoj el ĉiuj partoj de Ĉinio, ambasadoroj, ministroj, la Brita Popola Delegacio, membroj de la Administra Komitato de la Internacia Unio de Studentoj, estrata de Jock Kane, reprezentanto de la Mondfederacio de Sindikatoj E. Thorton, kaj reprezentantoj de la Sovetiaj Sindikatoj kaj de laboristoj el Indonezio, Vietnamo kaj Pollando.

La industriaj laboristoj, multe pli elegante vestitaj ol antaŭ unu jaro, montris siajn atingojn en produktado per grafikaĵoj kaj modeloj. Jen estis grafikaĵo montranta kiel la teksejoj superis sian celajon je 25 procentoj, jen estis alia montranta kiel la Pekinaj tramlaboristoj pliiĝis la

nombro de kilometroj kurataj je preskaŭ 50 procentoj. Iliaj sloganoj diris: "Ni promesas plenumi nian 1951-planon." La karboministoj ricevis specialan huraon por serio de grafikaĵoj montrantaj la rapidan leviĝon de la nacia rekordo de karbominado de post la 1-a de januaro. La ŝtallaboristoj portis grandan karikaturon kun la vortoj: "Ni verŝos nian varmegan ŝtalon sur la kapojn de la agresantoj."

Kiam la ĝojkriantaj miloj da junuloj plenigis la placon, ili levis laŭvice, por saluti Prezidan-

Ĉi tiu estis la propra tago de la popolo mem. La parado estis el ilia propra inventemo. Ĉiu homo alportis iun specialan kaj dekoracian trajton al la brila sceno. Granda modelo de la terglobo, kun kolombo sur si, malfermiĝis kaj eligis verajn kolombojn de paco, kun koloraj rubandoj sur siaj vosto. Konstru-laboristoj portis modelon de sepetaĝa domo kiu estos imita en Pekino je la fino de ĉi tiu jaro. Jen minoritatoj en siaj kolorplenaj kostumoj. Jen grupoj da knabinoj en brila ruĝa kaj verda silko.

Multaj grupoj portis reproduktajn de siaj paktoj de patriotismo skribitaj en multaj lingvoj.

Tiaj paradoj okazis ne nur en Pekino sed ankaŭ en vilaĝoj tra la tuta vasta lando. Ĉirkaŭ 200 milionoj da popolanoj partoprenis en manifestacioj en Maja Tago tra tuta Ĉinio.

En multaj provincoj kaj regionoj, pli ol duono de la loĝantaro elvenis sur la stratojn en tiu tago. Mamutaj paradoj okazis eĉ en la plej malproksimaj limregionoj. Dum la manifestaciantoj en Kantono jam surportis siajn malpezajn somervestojn, kirgizoj kaj hazakoj en la monta regiono de la nordokcidenta landlimo ankoraŭ marŝis, tra neĝo en siaj paradoj, en pezaj peltoj.

La Maja Tago venis kaj forpasis kun siaj gigantaj paradoj, sed longdaŭra estas la porpaca batalo. La granda ĉina popolo jam unuiĝis por defendi sian malfacile gajnitan felicon. Ĝi revuis sian forton en la Maja Tago kaj reiris al sia batalposteno kun renovigita energio. Nun la duobla kampanjo por voĉdoni kontraŭ la rearmado de Japanio kaj subskribi por subteno al la Berlina alvoko por Kvinpotenca Paĉpako jam donis pli ol 210 milionoj da voĉdonoj kaj egalan nombron da subskriboj.

Paĉpako-subtenantoj ankaŭ ĵurigis sin al pozitiva ago por plifortigi la movadon de rezisto al Usono kaj helpo al Koreio. Ekzemple, 510 civitanoj de Tienzin (天津) petis aliĝi al la ĉinaj popolaj volontuloj dum la voĉdonado. En iu laborejo en tiu urbo, laboristoj decidis produkti 100 ekstrajn maŝinojn dum la dua kvarono de la jaro. Ĉiuj sekcioj de la loĝantaro tra la tuta lando donacis grandajn sumojn kaj donacpagojn al la Korea Popola Armeo kaj la ĉinaj popolaj volontuloj.

Ĉi tiu granda movado defendi pacon kaj rezisti Usonan agreson estas antaŭen puŝita de potenca leviĝo de produkta entuziasmo, de la senekzemplaj atingoj de la landskala patriota konkursmovado. Ĝin inspiris la nesuklebla decido de la laboranta popolo por defendi siajn revoluciajn gajnojn, plenumi la taskojn de novdemokratia revolucio kaj tiel krei la kondiĉojn por estonta socialisma transformiĝo de sia lando.



Prezidanto Maŭ Ze-tung salutas la manifestaciantojn en la Maja Tago. Dekstre de li staras viceprezidantoj Ĉu Teh kaj Liu Ŝaŭ-ĉi (劉少奇), kaj maldekstre ĉefministro Ĉou En-laj (周恩來).

ton Maŭ Ze-tung, blankajn kolombojn, florojn, librojn kaj pilkojn.

Kiam ili pasis, aeroplanoj superkape faligis fluojn da multkoloraj folietoj kiuj flirtis malsupren renkontataj de centoj da kolomboj liberigitaj de la marŝantaj amasoj malsupre.

Sennombraj vicoj da katolikaj monahinoj, budaistaj monaĥoj kaj lamaoj, huraantaj, "Vivu Prezidanto Maŭ! Rezistu Usonon, helpu Koreion." ricevis grandan ovaĉon. Iu maljunulo gajnis varman aplaŭdon de la rigardantoj, kiam li paŝegis antaŭen svingante sian bastonon kaj plenvoĉe kriante sloganojn.

La Patriota Movado de la Ĉina Studentaro

Mallongigo de la raporto de Jang Ĉeng (楊誠)
vicprezidanto de la Internacia Unio de Studentoj

Dum la lasta duonjaro, la ĉina studentaro, kune kun la ĉina popolo, disvolvis grandskalan kampanjon kontraŭ Usono kaj por Koreio. Ni kredas, ke la batalado kontraŭ la agreso fare de la Usona imperiismo al Koreio kaj Tajvan estas ne nur patriota movado de Ĉinio kaj Koreio, sed ankaŭ grava konsistiga parto de la movado por defendi la pacon de Azio kaj tiun de la tuta mondo.

Kiel lando iom malfrue suririnta la vojon de imperiismo Usono sekvadis en la komenco la alian imperiismajn landojn, kaj plejparte efektivegis sian ekonomian kaj kulturalan invadon al Ĉinio en pli ruza maniero, kiel lupo en ŝafa felo. Tamen el la ĉiam pli multigantaj agresaj krimagoj fare de la Usonaj imperiistoj al Ĉinio post la venko super Japanio en 1945, la ĉina studentaro ekkonis la ferocean lupvizagon de la Usonaj agresantoj kamuflitaj per la t.n. "Helpe" de Usono. Por la sendependeco kaj honoro de sia patrolando, la ĉinaj studentoj ne nur firme rezistis la minacojn kaj tentojn de la Usonaj imperiistoj sed multaj el ili forlasis siajn lernejojn, partoprenis la Popolan Liberigan Armeon kaj eklevis pafilon rekte kontraŭ la Kuomintang-reakciularo, la hundaĉoj de la Usona imperiismo. La senhonta intrigo de la Usonaj imperiistoj interveni ĉinajn enlandajn aferojn kaj malutiligi al la ĉina popolo, finfine spertis hontindan fiaskon.

Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ĉie prosperas nova vivo kaj konstruado tra la vastega lando de Ĉinio. La ĉina studentaro aktive partoprenas la konstruadon de sia patrolando kaj sentas goĝegon kaj instigon vidante ke ĝi supren levigadas kiel la matena suno. Sed la elpelitaj Usonaj imperiistoj kaj la Kuomintang-reakciularo ne povas toleri vidi la antaŭen-marŝadon de la ĉina popolo al libera kaj feiĉa nova vivo. Ili entreprenadas diversajn intrigojn intencante strangoli nian novnaskitan patrolandon. La Usonaj imperiistoj publike komencis invadimiliton kontraŭ Koreio, ĝia militŝiparo invadis nian teritorian maron ĉirkaŭ Tajvan, ĝiaj aeroplanoj buĉis niajn pacajn loĝantojn en Nordoriento per bomboj kaj kugloj, kaj eĉ antaŭen pusi la militan fajron ĝis nia nordorienta landlimo. Ĉiuj ĉinaj studentoj sin jetis en aktivan agadon, donis pozitivan subtenon al la Deklaracio de la Ĉinaj demokratiaj Partioj, amase partoprenis la grandan kampanjon de la tuta popolo kontraŭ Usono kaj por Koreio, kaj aktive bataladas por haltigi la invadon.

Por defendi sian patrolandon kaj frakasi la ambicion de la Usona imperiismo, ĉie tra la tuta lando miloj kaj miloj da talentaj studentoj torente enfluis en diversajn militkadrinstitutojn de la Popola Liberiga Armeo aŭ partoprenis la konstruadon de moderna nacidefendo.

Kaj plie, la tutlanda studentaro montris en diversaj manieroj, ardan kaj sinceran helpemon al la korea popolo, ĉe kies flanko troviĝas la justeco. Studentoj de la Nordorienta

Instruista Kolegio organizis sangoferan grupon de pli ol 1,700 membroj. Ankaŭ studentoj de Tanner (端納) Flegista Lernejo en Kantono kaj aliaj lernejoj organizis sangoferajn grupojn. Diverslokaj studentoj amase sin jetis en la movadon por faradi vatitajn vestojn, gantojn kaj donacosaketojn kaj ili oferis grandan kvanton da donacoj por la pabatalantoj en Koreio. La granda venko de la Korea Popola Armeo kaj la Ĉinaj Volontuloj plibone malkaŝis la veron, ke la Usona imperiismo perdinta la subtenon de la popolo, estas nur papertigro, ke la solide unuigitaj pacamaj popoloj povas ĝin venki plene.



Li Su-lan (李書蘭), studentino de la Alta Lernejo por Mongoloj kaj Tibetanoj, laŭte plendas kontraŭ Usona agreso.

Dum la tutĉinia studentaro aktive agadas en la kampanjo kontraŭ Usono kaj por Koreio, Usona imperiisto W. Austin eĉ faris ĉe la Sekureca Konsilo, la 28an de nov., 1950, senhontan paroladon menciante en tono de bonfaranto la nomojn de la lernejoj fonditaj aŭ subvenciitaj de Usonaj misiaj asocioj kaj la nombron de iliaj diplomitoj. Li senhonte pretendis, ke tio estas "tradicia amikeco de Usono al Ĉinio" kaj "kultura interŝanĝo inter Usono kaj Ĉinio".

Sed jam de la komenco la Usona imperiismo praktikadis sian kulturalan agresadon al Ĉinio fondante lernejojn sub la kamuflado de "kultura interŝanĝo" kaj "amikeco". Multaj lernejoj fonditaj de la Usonaj misiaj asocioj estas konstruitaj sur la terpecoj rabitaj for de ĉinaj loĝantoj. La Usonaj misiaj lernejoj en Ĉinio estas fakte nur kulturaj koncesioj kaj narkotikaj fabrikoj de Usono.

Tiuj malicaj kalumnioj kaj blaspemoj de W. Austin indignigis la tutan popolon de Ĉinio, kaj precipe la studentojn de la misiaj lernejoj. Responde al la kalumnioj de W. Austin, ili agadas pli firme decide en la patriota movado kontraŭ Usono. Ekzemple, cent procentoj de la studentinoj de Ginling Knabina Kolegio en Nankino kaj pli ol 95 procentoj de la studentoj de Nankin-a Universitato subvenciita de Usono,

partoprenis la denuncadon pri la krimoj de la Usonaj imperiistoj. Pli ol 700 lernejoj kaj hospitaloj subvenciitaj de religiaj asocioj en pli ol 20 urboj en la tuta Ĉinio partoprenis la patriotan kampanjon kontraŭ la kalumnioj de W. Austin. La studentoj de ĉiuj misiaj lernejoj varme subtenas la decidon de la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro de Ĉinio por la politiko en "Disponado pri la de Usono subvenciitaj kulturaj, edukaj, helpodonaĵaj kaj religiaj institutoj." Post kiam la popola registaro transprenis la misiajn lernejojn kaj provizis pli multe da bonaj profesoroj kaj instalatoj, la entuziasmo en lernado de la studentoj pli ardigis kaj la lernejoj nun impresas per sia nova vivo.

La ĉina popolo pruvis per siaj spertoj: sen la t.n. "helpe" de la Usonaj imperiistoj ni povas ne nur pli vivi, sed eĉ vivi pli bone; sendepende de la t.n. "kultura interŝanĝo" de la Usonaj imperiistoj, ni ne nur povas daŭre funkciigi niajn kulturajn kaj edukajn institutojn, sed ankaŭ ilin disvolvi pli rapide kaj perfekte. Hodiaŭ la tefa tasko de la ĉina studentaro en la patriota movado kontraŭusona estas protesti kontraŭ la rearmado fare de la Usona imperiismo al Japanio.

Post la gravaj malvenkoj en la agresa milito, la Usonaj imperiistoj ne nur ne pentas sian fragon, sed ekintencas fari apartan pactraktadon kun Japanio, rearmu Japanion kaj peladi la japanajn studentojn en kanontubojn. Hodiaŭ la ĉina popolo

Batalu por Koreaj Infanoj

(daŭrigo de p. 35)

estro. Tuj venis ordono ke ili neniel kunportu la knabon sed sendu lin al la apuda labor-grupo de la Korea Popola Armeo kiu sin okupis pri loka reordiga laboro kaj kapablis lin prizorgi.

Amara sento de adiaŭo tuj jetis sian ombron sur la tutan batalionon. Tiu kiu sentis plej profundan doloron estis la knabo. "Bona onklo, permesu min iri kaj batali kun vi," la knabo iris de unu batalanto al alia kaj petis malĝoje. Ĉiuj lin rifuzis kun doloro en koro: "Ni ja iros batali. Kiel ni povas vin kunporti?"

En la momento antaŭ la foriro la politika komisaro de la bataliono, Liu Ĉeng-ĉaj (劉成齋) venis al la maŝin-pafila roto por kontroli la batalpreparan laboron. La knabo tuj kaptis lin.

"Bona onklo, permesu min iri batali kun vi," li ĉirkaŭprenis la talion de Liu kaj pacience lin petis. "Mia knabo, vi estas ankoraŭ tro juna. Vi ne povas iri kun ni."

"Bona onklo, permesu min iri batali kun vi," li ĉirkaŭprenis la kurojn de Liu kaj daŭre petis.

"Bona knabo, vi iru unue al la laborgrupo. Ne estas necese por vi iri batali. Ni mem povas ilin ĉiujn flegi."



La studentino faras donacosaketojn por la volontuloj en Koreio.

ankoraŭ freŝe memoras pri la diversaj brutaj barbarajoj de la japanaj invadistoj. La perfidaj fiagoj de la Usona registaro disŝiri la de ĝi mem subskribitajn Deklaraciojn de Kairo kaj Potsdam kaj rearma Japanion, estas minaca provoko ne nur al la 475.000.000 ĉinoj sed ankaŭ al ĉiuj Aziaj popoloj kaj al la mondopaco! La ĉinaj studentoj, kune kun la tutaziaj junuloj kaj popoloj, firme decide batalados kontraŭ la rearmado al Japanio fare de la Usona imperiismo, por la realigo de ĉiuflanka kaj justa pactraktato kaj nemilitarista, sed demokrata Japanio.

—Esperantigis Laŭlum

* furioza, sovaĝa, kruela.

† kamufl=maskumi, alivesti.

‡ peco de teritorio kies okupado kaj uzo estas donitaj al alia lando.

"Kial do vi ne permesas min iri?" la knabo subite prenis sur sin rigidan sintenon, malsukcesinte en sia petado.

La embarasa situacio daŭris por longa tempo. Komence, la interkontaktanto fidele interpretis por ili. Baldaŭ li trovis ke tiuj demandoj kaj respondoj alportas nenian rezulton kaj li decidis ke li mem faru klarigojn rekte al la knabo.

Fine la knabo akceptis la konsilon de la interkontaktanto. Unu post alia la batalantoj adiaŭis lin per manpremo kaj marŝis sur la vojon al batalo.

Kortuŝite kaj bedaŭrante la adiaŭon, la knabo akompanis la "onklojn" por longa distanco kaj fine disigis de ili kun larmoj en la okuloj, reirante kun kuriero.

Post la foriro de la knabo la bataliono marŝis antaŭen per pli rapidaj paŝoj. "Ni batalu decide kaj obstine," ĉiuj batalantoj pensis indigne, "por koreaj infanoj!"

Esp-igis I. K.

* Arme-laboranto kiu ĉefe servas kiel interpretanto.

† Rizo algluŝinta ĉe la fundo de la kaldrono pro kuirado. Tiu ĉi algluŝita flava aŭ nigra en koloro estas manĝebla, tamen ĝi ne estas rigardata kiel regula manĝaĵo.

Batalu por Koreaj Infanoj

Li Ĉuang (李莊)



Ĉina volontulo kun korea infano

EN ia senco, la ĉinaj popolaj volontuloj heroe batalas por la koreaj infanoj.

La koreaj infanoj estas tre viglaj kaj ĉarmaj. Kreskante en lando kie estas belaj montoj kaj riveroj kaj kie la popolo laboras diligente, la infanoj montras karakterojn de saĝeco kaj simpleco. En la hejmo pli aĝaj fratinoj sep- aŭ ok-jaraj piste senŝeligas rizon kun sia frateto sur dorso, dum geknaboj pli-ol-dek-jaraj akompanas siajn patrinojn al la kamparo kaj helpas ilin en la laboro. Ili amas kanti popol-kantojn signifoplenajn kaj surmeti vestojn belajn, mildajn en koloro, manifestante facilajn kaj kvietajn tonojn. Lastsomere kiam mi estis en Norda Koreio, mi vidis grandan nombron da blanke vestitaj infanoj ludantaj kaj irantaj tien kaj reen sur verda kampo, kvazaŭ kolomboj de paco flugantaj en la aero. Same kiel ĉiuj aliaj infanoj en la tuta mondo, la koreaj infanoj bezonas pacon kaj trankvilecon.

Sed la paco kaj trankvileco estas jam detruitaj de Usonaj invadantoj. La koreaj infanoj kaj ilia patrolando kune kun iliaj patrinoj suferas senprecedencan katastrofon. Multaj kaj multegaj infanoj mortis antaŭ la okuloj de staj patrinoj, lasante neforgesblan doloron al ili. Multaj kaj multegaj patrinoj de infanoj fariĝis orfoj kaj finfine tiuj infanoj fariĝis farigis senkulpaj viktimoj. Senprecedenca grandskala masakrado jam progresas pli ol 200 tagojn en Koreio.

Kiom da koreaj infanoj perdis sian vivon! Kaj kiom da koreaj infanoj fariĝas vaguletoj!

Junokte antaŭ tagiĝo en lasta oktobro, vagis knabo 12-jara sencele norden. Sencele? Ne, ne estas tute prave tiel diri. Li iam aŭdis ke en la nordo estas lando Ĉinio kiu estas granda kaj bona. Kaj nun li ja estis iranta al Ĉinio. Sed kie kaj kia Ĉinio estas, tiu ĉi knabo ne klare sciis.

La knabo estas el Hiĉun distrikto. Lia nomo estas Kim Hjo-ĉu. Li iam vivis gaje kaj senĝene kun la patro kaj patrino. Sed luposttagmeze kiam la ĉielo estis plena de nuboj, du Usonaj aeroplanoj subite atakis lian vilaĝon. Post terura tremado kaj grandega bruado, la knabo trovis ĉie fajron kaj fumon, ĉie sangon kaj kadavrojn kaj ĉie plor-kriojn. Li ne bone memoris kiel li adiaŭis siajn gepatrojn trempitajn en sango, kiel li forlasis sian kabanon el kiu restis nur kelkaj ter-muroj kaj kiel li surpaŝis la vojon al la nordo. Survoje li ankaŭ aŭdis aliuojn paroli pri Ĉinio kaj tial decidis iri al tiu granda lando.

Por juna knabo estas tre longa distanco de Hiĉun al Unsongli sude de

En la intermonto li renkontis taĉmenton neniam antaŭe viditan. Tiu taĉmento elmontris rigoran disciplinon kaj parolis lingvon tute fremdan. Ĝi estis taĉmento de la ĉinaj popolaj volontuloj, kiuj estis poste huraitaj per "vivu!" kaj gajnis grandegan triumfon por la ĉina kaj korea popoloj.

Aŭdinte de la preterpasantoj ke ili estas la ĉinaj popolaj volontuloj, la knabo tuj haltigis sian pezan paŝon, kaj staris apud la vojo gapante al ili.

La knabo havis palan vizaĝeton kaj paron da grandaj sed senbrilaj okuloj. Lia atentema kaj kvazau stulta esprimo altiris la atenton de ĉiuj komandantoj kaj batalantoj. La interkontaktanto* aliris al li kaj demandis kio okazis al li. La knabo detale rakontis al li sian mizeran travivaĵon kaj poste balbutis ke li iras al Ĉinio.

"Al Ĉinio!" Komandantoj kaj batalantoj ĉiuj ekvigligis ĉe tiuj vortoj. Kelkaj el ili elprenis manĝaĵon kaj aliaj alportis siajn akvujojn. Post kiam la knabo satigis, liaj larĝoj elfluis kviete sur la vangojn.



Infano, kun sia patrino mortigita de la Usonaj invadantoj.

Tiu ĉi taĉmento estis atendanta okazon por batali kaj ili ne povis resti longan tempon. La komandanto sendis du kurierojn kunporti la knabon kaj rapidege skribitan leteron al la supera oficiro, proponante ke la knabo estu sendata al la postfronta serv-sekcio kaj de tie al nia patrolando.

La knabo iris al la nordo—al nia patrolando. La taĉmento iris al la sudo—al la direkto kie la malamikoj faris atakon. La larĝoj de la knabo jam engutis en iliajn korojn kaj run kun fajro de kolero en la brusto ili serĉis la komunajn malamikojn de la ĉina kaj korea popoloj.

La taĉmento marŝadis antaŭen tra la montaro de Norda Koreio. Kiam ili alvenis al klifo proksime de rivereto, subite unu kuriero kuris al

la vic-estro de la bataliono, Ĉen Te-zun (陳德俊). Lia malfacila spiregado donis la impreson ke io grava okazis. Sed li diris nur: "Permesu min raporti al vi, estro, ke estas infano tie en la valetto, senhelpa kaj livivo plenaj de rugfoliaj arboj daŭrigis ŝancebligante kaj malforte sian vojaĝon.

La tuta korpo de la infano estis sangomakulita, kvankam ĝi mem ne estis vundita. Ĝi surhavis nur ĉifonan lantrikoton dum ĝia malsupra parto estis tute nuda. Laŭ la brutaj agoj faritaj de la malamikoj, oni povas diveni ke la patrino de tiu ĉi infano estis sendube mortigita de malamika aeroplano. Eble la infano mem rampis de sur la dorso de sia patrino aŭ iu bonkorulo ĝin malligis el la dorssako kaj ĝin lasis en la valetto. Nun ĝi tremegis pro frosto kaj vekriis kordolorige pro raŭka voĉo.

Ĉen Te-zun demetis sian vatitan veston kaj vindis per ĝi la kompatindan infanon. Iom post iom ĝi ĉesigis sian ploradon, eligis sian langeton kaj lekis avide la vizaĝon de Ĉen, kvazaŭ mamsučanta. Ĉen sentis subitan doloron en sia koro kaj liaj larĝoj elfluis guton post gutto. Li estis batalanto kun fera volo, neniel emis al plorado kaj estis fervora leganto de la bone-konata sovetia novelo "Tage kaj Nokte." Neniam antaŭe li ploris, sed ĉi-foje li ploris tute senkonscie. Li ekpensis pri tiu Sovetia virino kun siaj infanoj en la subtera ĉambro de la komandejo de Saburov kaj li sentis, kvazaŭ akra tranĉileto traborus en lian koron.

de amik-batalantoj kiuj ĉirkaŭiris por sieĝi de malantaŭe la malamikojn kaj ekstermi ilin. Batalante kontraŭ malamikoj kiuj multege superis ilin en nombro, Ĉen neniam forgesis la infanon kaj ĉiam pli kaj pli kreskadis liaj forto kaj malamo kontraŭ la invadantoj. Unufoje kiam la batalo plej furiozis, Ĉen skribis leteron al la regimentestro por esprimi la decidemon de si mem kaj ĉiuj batalantoj. Interalie li skribis: "...Pli ol du batalionoj da malamikoj atakis kaj reatakis nin kvinfoje sed ĉiujfoje ni rebatis ilin. Ni havas la decidemon kaj memfidon sekurgardi nian pozicion kaj ni donas al vi garantian pri tio. Ni sekvos la ekzemplon de K-do Saburov." Estas vere ke ili ĉiuj sekvis la ekzemplon de Saburov kaj firme tenadis sian pozicion.

Tiu ĉi bataliono batalis de Norda Koreio al la suda bordo de Ham-Rivero. En la montaro proksime de Kĵunganli ili renkontis alian korean knabon. La knabo estis 13-jara kaj venis de Kaipin-Gubernio. Li ja havis antaŭe tre bonan kaj varman hejmon, sed la tuta familio suferis la saman malfeliĉon kiel tiu de la supre dirita knabo Kim. La Usonaj malamikoj mortigis liajn gepatrojn, fraton kaj bofratinojn kaj bruligis ilian domon. Kaipin estas 100 kilometrojn de Kiunganli. Same kiel Kim, tiu knabo ankaŭ ne povis diri kiel li faris tiel longan vojaĝon.

La knabo estis malgrasa kiel skeloto kaj surhavis someran veston en tia frosta vintro. Iutage li iris sola kaj melankolia al la kuirejo de la maŝin-paŝila roto, prenis pecojn da kaldron-agluaĵoj de la tablo kaj ilin mangiis. "Kial li mangas tion?" demandis la batalantoj unu al alia, "certe li estas treege malсата. Ni donu al li rizaĵon." Depost tiu tempo la knabo restadis ĉe la nekonataj "bonkoruloj" (tiel nomis li la volontulojn) kaj komencis vivi senzorge.

Multaj el la batalantoj de tiu bataliono iam vidis la Sovetian filmon, "La Filo de la Regimento." Ili ĉiuj admiris tiun kuraĝan skolon kaj amis tiun ĉi korean knabon senparencan. Kiam ili ricevis sian porcion de sukero, ili ĝin donis unue al la knabo kaj tiam ili ricevis sian porcion de enladigita manĝaĵo, ili faris la samon. Ili fosis por li specialan kontraŭ-aeratakan ŝirmeton kiu estis bone konata al la tuta roto. Ili ankaŭ banis lin per varma akvo. Sur la koreaj batal-kampoj bano estas ja granda afero kaj ĉiuj kiuj iam restis tie bone scias kiel malfacile estas varmigi akvon.

En tia cirkonstanco la knabo sentis grandan kontenton. Li nomis ĉiun batalanton "onklo". Li kantis por amuzi ilin. Li lernis de ili la ĉinan lingvon. "Kiam la usonanoj estos forpelitaj", li diris, "mi iros kun vi, onkloj, al Ĉinio."

La feliĉa vivo de tiu knabo ne longe daŭris. Post 3 aŭ 4 tagoj la batalantoj ricevis novan komision kaj ili devis marŝi antaŭen kaj ataki la malamikojn. Ĉiuj el ili ne volis disigi de la knabo, tamen ili ne povis lin kunporti al la fronto. Post longa interkonsilado, ili povis fari neniam alian el peti konsilon de la batalio-

(daŭrigota sur p. 34)

Jen la Usona Armeo!

Tan Ven-Juej (譯文瑞)

De kiam la invadarmeo Usona suferis gravajn malsukcesojn en Koreio, la militprovokistoj, kiel Truman, MacArthur kaj aliaj fanfaronis foje kaj refoje ke ili sendos pli da trupoj al Koreio, sed malgraŭ tio ili povas neniel kaŝi sian malfortecon manko de homforto. La Usonaj oficiroj kaj soldatoj kaptitaj lastatempe de la ĉinaj volontuloj kaj la Korea Popola Armeo jam plene malkaŝis la perpleksan situacion de Usonaj invadintoj en ĉi tiu rilato.

Dum la invadmilito en Koreio la perdo de Usonaj trupoj estas tre granda. Dum la Dua Mondmilito la Usona Armeo perdis nur iom pli ol 270,000 homojn sed en la pasintaj naŭ monatoj ĝi jam perdis 100,000 (laŭ la cifero citita en New York Daily Worker, la 4an, marto, el la New York Herald Tribune). Sufiĉe fatala al Usono estas tia perdo de soldatoj, tial ke suferante pezan baton, la Usonaj divizioj operaciantaj en Koreio ne povas ricevi ĝustatempanj rekrutojn por anstataŭi la perditajn. Ofte la nombro de soldatoj en unu regimento egalas tion en bataliono kaj tio en bataliono fakte ankoraŭ ne sufiĉas por unu

roto. Iam ili vole-ne-vole replenis siajn trupojn per sudkoreianoj. La proporcio de Sudkoreiaj soldatoj en kelkaj divizioj iam atingis pli ol trionon. Melvin Star, rotestro de la 23a Regimento de la 2a Divizio, kaptita en Hoengsung-batalo, diris: "Laŭ la formacio de Usona armeo unu roto devas havi ĉirkaŭ 225 oficiroj kaj soldatojn, sed dum longa tempo mia roto havis nur pli ol kvindek, kaj poste ĝi estis replenigita per kvindek Sudkoreiaj soldatoj kaj nur lastatempe atingis la nombron de cent kvindek."

Per kio la Usonaj invadantoj replenis siajn trupojn en Koreio? Unuflanke ili eltiras soldatojn el aliaj trupoj kaj aliflanke rekrutigas novajn soldatojn kaj rezervanojn. "Sufiĉas, se ili povas servi kiel kanonfuraĝo sed ne gravas ĉu ili povas batali aŭ ne" kaj tial ŝipon post ŝipo la rekrutoj estis transportitaj de la alia bordo de Pacifiko. Sed kiaj estas la soldatoj? De la militkaptitoj lastatempaj ni povas scii la kvaliton de la rekrutoj.

Jacob Scott, unuaklasa soldato, ĵus gradiginte de liceo rekrutiĝis en lasta oktobro, kaj kiam li nur eller-

Historieto de Clement Pretrasiewicz, serĝento de la 11a Roto, la 23a Regimento, la 2a Divizio de Usona Armeo



Surbordigas ĉe Fusan

Atendante ekspedon

Al la fronto

nis pafi post semajna trejnado li estis sendita al Koreio kiel infanteriano de la 3a Roto, la 1-a Baltaliono, la 9a Regimento de la 2a Divizio. Post lia alveno al Koreio, li ankoraŭ ne havis la ŝancon por pafi.

La deksepjara duaklasa soldato George Menamala, antaŭe estis klarionisto de la 3a Divizio, kiu postenas en Usono. Sendite al Koreio en lasta decembro, li estis asignita kiel maŝinpafisto de la 5a Roto de la 21a Regimento en la 24a Divizio. Li plendis: "Mi pensis ke ili sendos min al Tokio sed Dio scias, kiel mi estis sendita al Koreio entute netrejnite. Por klarioni mi estas lerta, tamen por pafi mi estas tute malsperta." Li estis kaptita en sia unua batalo.

Oscar Booker, unuaklasa soldato de la 3a Roto de la 9a Regimento de la 2a Divizio, estas negro absorbita en kuirado ekde junaĝo. Antaŭ multaj jaroj li jam decidis fariĝi konata kuiristo, kaj iam lernis kuiradon en speciala lernejo. Poste li ĉesigis la studadon pro financa malfacilo, soldatiĝis en aprilo de lasta jaro kaj fariĝis kuiristo en la trejna kampejo por rekrutoj. Post kiam li estis sendita al Koreio li estis ordonita manipuli fusilon anstataŭ legomon kaj kuirpoton".

Andrew Ross estis sperta mekani-kisto dum la Dua Mondmilito, kaj retiriĝinte de servado postmilito, li servis kiel teknikisto en iu maŝin-fabrika. Timante ke li estos sen-labora, kiam alvenis la krizo, li sin registris kiel rezervano, sed dum ĉi-tiuj jaroj li neniel profitis el la armeo. Subite li ricevis en lasta novembro sciigon de la Ministerio de Armeo, ke li denove armeaniĝu ĉifoje ne kiel mekani-kisto, sed infanteria soldato.

Unuaklasa soldato de la Roto 38a Regimento, la 2a Divizio, Frank Dillon, havas altgradan miopecon. Ĉar li volis lerni teknikon de radio, li soldatiĝis en aŭgusto 1945, sed restinte en la trupo nur dum unu kaj duona jaroj kiel radikomunika soldato, li retiriĝis de servado. Poste li lernis en universitato dum tri jaroj kaj estis konskriptita en lasta decembro. Kiam ili sendis lin al Koreio por replenigi la infanterion de la 2a Divizio, li nur ricevis trejnadon dusemajnan. Mi demandis lin: "Portante tiel altgradajn okulvitrojn kiel vi povas ĝuste celi?" kaj eklevante siajn sultrajn, li diris: "Dio scias! Antaŭe ili ne akceptis tian kiam mi por infanteriano, sed, vi scias, kiom mankas al ili infanterianoj nun!"

Oni diras, antaŭe hemoroiduloj en Usono povis liberiĝi de militservado, sed nun la maljunaj, malfortaj, malsanaj, ĉiuj estas konskriptitaj. El la centoj da militkaptitoj estas multaj marasmuloj, eĉ ne malmultaj havas gravajn malsanojn. James Earl, kaporalo de la 3a Roto, la 19a Regimento, la 24a Divizio, suferis de anemio dum multaj jaroj. Robert Bunnell de la 7a Roto, la 21a Regimento, la 24a Divizio estas ftizulo en la dua periodo. Aliaj suferas de malsanoj kiel de stomaka ulcero, kronika bronkito ktp. Kiam ili parolis pri sia malsano, ili plendis unuvoĉe ke la generaloj de Pentagono ne indulgas eĉ tiajn malsanulojn kiaj ili.

Per tiaj rekrutoj repleniĝas la severe batita Usona invadarmeo. Estas senbezona diri kiel mizera estas ilia batalforto. La taglibro de Clement Pretrasiewicz, serĝento de la 11a Roto, la 23a Regimento, la 2a Divizio, estas interesa ironio kontraŭ si mem:

20an, jan. Surbordigis ĉe Fusan.
21an, jan. Atendis ekspedon.
22an, jan. Ekiris al la fronto.
23an, jan. Sin anoncis en la roto.
28an, jan. Iris skolti.
29an, jan. Kaptita.
Pretrasiewicz estis nova rekruto, kaj nun lia posteno atendas novan rekruton.

Trad. Ilin



Sin anoncas al la rotestro

Iras skolti

Kaptita.

Levigo de Li Aje en la Agrara Reformo

(daŭrigo de p. 37)

junulino plej frue vizitis ĉiun ajn kunvenon. Kiam okazis kunveno nokte, eĉ en alia vilaĝo, ŝi ankaŭ kun torĉo en mano iris partopreni kun ŝanceliĝantaj paŝoj. Kun malfermigitaj okuloj ŝi observadas la bienulojn. Aŭdante onidiron ŝi tuj demandas pri la deveno, kaj trovinte kontraŭlegajn agojn de la bienuloj ŝi tuj raportas ilin al la Kamparana Asocio.

Perspektivo post la levigo

En la tago kiam okazis la "leviga kunveno", Man-ze kaj Liaŭ-ĉen levigis frumatene. Ankaŭ levigis ĉiuj kamparanoj de Hutu-domo. La kunveno estis malfermata la duan h. pm., kaj la geknaboj jam antaŭ longe grimpis sur la per koloraj silkruhandoj ornamitan podion sur kiu pendis la portreto de Prezidanto Maŭ. Ili kantis jen "Kiu vivtenas kiu" jen "Floras ferarbo de mil jaroj", vere pli ĝoje ol ĝui 10 nov-jarojn. Sur la kolonoj de la podio surgluigis paro da ruĝpaperaj sloganoj: "Forigu la feŭdalismon per revolucio" kaj "Defendu la patrolandon kontraŭ Usono". Supre estis horizontala skribajo "Tutmondaj kamparanoj apartenas al unu familio" — la plej forta el la devizoj por

fortikigi la kamparanan fronton.

Por gardi la bovojn de la murdo de la bienuloj, kelkaj bovoj, kiujn oni konfiskis de la bienuloj, estis provizore bredataj en kamparanaj hejmoj; ĉi-matene oni ilin elkondukis kaj ligis ĉe la arboj destinitaj de la Kamparana Asocio. Antaŭ la placo plene amasiĝis kultur-instrumentoj konfiskitaj: akvo-radioj, bareloj, gren-ventoliloj. Sur ili la bienuloj estis per lako skribintaj ekz.: "Hu... aĉetis en la jaro....", nun la kamparanoj skribis per kredo: "Dankon al Prezidanto Maŭ" "Bone produktu por konstrui novan Ĉinion". La geknaboj tamburis kaj tamamis. La respondeculoj de la Kamparana Asocio elprenis kelkajn pakegojn da teraktoj de la bienuloj, zorge volvitaj per bona papero aŭ silko, sur kiu surskribiĝis diversspecaj kruelaj ekspluatataj kondiĉoj. La kamparanoj kun indigno rigardis la amason da sklavigaj kontraktoj, kraĉis al ili, kaj pikegis ilin per lancoj.

Dum la bruligado de la teraktoj de la bienuloj, la kamparanoj ĝojis aplaudante kaj saltante. Petardoj krakadis. Klakfrapante la manojn la kamparanoj levis sian kapon kaj fikse rigardis la nigrajn papercindrojn ŝanceliĝante ŝvebantaj alten,

kvazaŭ timante ke la cindroj falus kaj referiĝus sklavigaj kontraktoj.

Li Aje, kiu staris inter la homamaso, eklarmis. Rigardante la ŝvebantajn papercindrojn en la serena ĉielo kaj la distribuajojn kiujn ŝi ricevis, ŝi diris kortuŝite: Se Prezidanto Maŭ venus kelkajn jarojn pli frue, mia Hu Juen-kuej certe povus vivi ankoraŭ dekelke da jaroj, kaj sub lia protekto ĝui iom da bona vivo.

Ni forlasis Ŝintuang-vilaĝon en la frumateno de la sekvinta tago post la "leviga kunveno". Mia penso ofte reiras al Li Aje. Nun ili estas jam plulantaj sian propran teron. Post kelkaj jaroj, kiam la agrikulturo de nia lando surpaŝos la vojon de modernigo, same kiel centoj kaj miloj da junaj kamparanoj levigintaj, kiom ĝoje kaj diligente Man-ze kaj Liaŭ-ĉen veturigos traktorojn plugante sur la bruneta kaj fekunda tero de Huran.

Trad. Jungsen

* ĝenerala nomo por plendkunveno kaj likvidkunveno

† Inĉan-novedzino: En la feŭda tempo, malriĉuloj vendis sian knabinon al riĉula familio kiel sklavino, kiu edziniĝos al ilia filo kiam ŝi maturiĝis.

‡ pez-unuo en Ĉinio, egalas al 31.25 gramoj.

Leviĝo de Li Aje en la Agrara Reformo

Ŝiaŭ Ĉian (蕭乾)



Patrino kun sia infano sub regado de Kuomintang-reĝimo (lignogravuro de Ĉaŭ Jan-nian).

LI AJE (李燧馳—Aje signifas "Avinjo" en la Hunan-a dialekto) estas malalta, kaj malgrasa maljunulo de Hutu-domo (胡涂家), Ŝinĉuang-Vilaĝo (新莊村), Joĵang-Gubernio (岳陽縣), Hunan-Provinco (湖南省). En ŝia buŝo restas nur kelkaj putraj dentoj. Sur ŝiaj alte elstarantaj vangostoj ŝrumpas malstreĉa haŭto; ŝiaj okuloj ofte larmas. Ŝi aspektas tiel maljuna kvazaŭ pli ol-70-jara, kvankam ŝi estas efektive nur 54-jaraĝa. Antaŭ la liberigo, ŝi almozadis tra la tuta vilaĝo kun korbo sub la brako kaj kun 8-jara filo nomata Man-ze (滿子) kaj 16-jara filino nomata Liaŭ-ĉen (了貞). Ŝi estis homo plej abomenata de la bienuloj en la vilaĝo.

La agrara reformo de Ŝinĉuang-vilaĝo komenciĝis en la fino de la pasinta novembro. Ĉijare, posttagmeze de la 25-a de januaro, la unua filio de la Kamparana Asocio de Ŝinĉuang-vilaĝo okazigis "leviĝan kunvenon" antaŭ la placo de Hutu-familio. Post 54 tagoj Li Aje tute ŝanĝiĝis en alian homon kiel centoj kaj miloj da kamparanoj savitaj de la agrara reformo. Ŝi ne nur ricevis porcion da tero, sendis sian filon al elementa lernejo, kaj ekcedzinigis sian filinon kiu estis donita al fizulo kiel infanovedzino; sed ankaŭ rektigis sian dorson distretitan de la diabloj de la malnova mondo.

Ŝia vivo povas esti rigardata kiel mejloŝtono sur la vojo irata de la vasta ĉina kampanaro batalante el la senfunda abismo de feŭda socio al nova demokratio. Sur tiu mejloŝtono gravuriĝis la travivaĵoj de la kamparanoj dum la sufera proceso, kaj markigis la sennombraj krimoj de la komplotantaj bienuloj, imperiistoj kaj Kuomintang-banditoj.

Dika kontlibro

Laŭ la paroloj de Li Aje en la "plenda kunveno" kaj "likvida kunveno", mi iom analizu la dikan kontlibron de ekspluatado kaj malutilado faritaj al ŝi de la kanibala malnova socio.

En ŝia 2-jara aĝo ŝia patrino mortis. Ŝia patro estis ŝuisto. Kompreneble estas malfacile por vidvo vivteni sin kaj sian infanon per manlaboro. Pro tio la patro kaj

filino ambaŭ devis vivaĉi kun mal-plenaj stomakoj.

Je la 8-jara aĝo ŝi estis sendita al iu familio kiel infanovedzino. La bopatrino estis terure tirana. Ĉiutage ŝi devigis ŝin porti kelkajn sitelojn da akvo, ŝpini tri liang-ojn da ŝpinaĵo, kaj krome plugi kampojn kaj nutri porkojn. Tiel laboregante ŝi ankoraŭ ne povis eviti batojn kaj insultojn. Kelkfoje ŝi estis batata eltirite el la lito.

Kiam ŝi estis 15-jara, ŝi edzinigis. La edzo estis diboĉulo, kaj ĉiutage vetludis ekstere. Ŝi iris labori en bienula hejmo: balai, kuiru, kaj lavi vestaĵojn de pli ol 10 personoj. Estante 21-jara ŝi naskis infanon, sed pro la manko de lakto por ĝin nutri, post nelonge ĝi mortis pro malsato.

Nun, la bopatrino restis same tirana al ŝi, kaj la edzo ankoraŭ diboĉa. Laborinte en la bienula hejmo ses jarojn, ŝi kaŝis 100 ĉenojn da kupromoneroj (1 ĉeno konsistas el 50 moneroj), per kiuj ŝi elaçetis sian liberecon kaj edzinigis al Hu Juen-kuej (胡元貴) servisto de Hutu-domo.

"Se oni volas gajni de bruto, oni devas dormi kun bruto." Tio prezentas la vivon de la geedzoj de la bienulo. Ili manĝis manĝorestaĵojn kaj loĝis en bovostalo.

Dum ĉiu sezono de la jaro Hu Juen-kuej vivis kun terpecoj. De frua printempo li jam devis plugi, kaj la glaciigintaj kotopecoj en la kampoj tranĉvundis kaj sangigis liajn plandojn. En julio li transĉerpis akvon ĝis meznokto kaj dormis sur la akvorado. En septembro li rikoltis la pajlon ankaŭ ĝis meznokto. Ĉiujare li rikoltis pli ol 70 hektolitrojn da greno, sed ne povis esti certe por li gajni 10 hektolitrojn. Lia korpo ne estis forta. En somero li transĉerpis akvon sub la suno varmega kiel fajrujo, kaj fine li svenis. Tamen la bruta bienulo eĉ medikamenton ne aĉetis por li.

Li Aje—malgranda kaj malgrasa virino, naskis tamen ne malmulte da infanoj. De ŝia dua edzo ŝi naskis entute 13 infanojn. Krom tiuj du kun ŝi vivantaj, ankoraŭ estas unu, kiu veturigas boaton de Joĵang; la ceteraj dek jam mortis infanaĝe. Ili mortis tiel: 1. Sub la reakcia regado, eĉ la gepatroj ne povis manĝi sate, ili kompreneble ne povis vivteni infanojn. Kiam infano naskiĝis, ŝiaj mamoj estis tamen sensukaj. La infano estis malgrasa kvazaŭ skeleto. Ili ne havis eĉ pecon da tukoj por ĝin vindi. De bonkoraj najbaroj la gepatroj pruntis garbon da pajlo. Sed uzante ĝin por kovri la infanon ŝi ne povis ne samtempe eltiradi la pajlerojn por hejtado. Tiel la pajlo iom post iom malmultiĝis, kaj kelkajn tagojn poste, la infano fine ĉesis spiri pro la frosto. 2. Unu knabo, kiun ili tiel malfacile kreskigis per almozado, estis forprenita al deviga militservo de Kuomintang en nokto hundboja.

La najbaraj rikampanoj kaj bienuloj estis samaĝaj kiel ŝia knabo, sed ilin neniu devigis al militservo. Nur ŝia knabo estis forprenita kaj neniam revenis. (Antaŭ la liberigo ŝi tre timis dumnokte la hundbojojn

en la vilaĝo, opiniante ke oni denove venas forpreni de ŝi knabon al militservo.) 3. Kelkaj infanoj malsanigis de ordinara malsano, ekz. febro, lakso, sed pro manko de mono ili ne estis kuracataj kaj sekve mortis. Nur unu el ili vivis ĝis ŝia 8-a jaro. 4. Ŝi konfesis ĝemante ke la oka infano estis mortigita de ŝi en akvokuvo je la naskiĝo. Tiam ŝi racie pensis: estus pli bone tuj fini ĝian suferadon ol lasi ĝin morti post kelktaga vivado. Sed post tio ŝi ploris dum pluraj tagoj ĝis ŝiaj okuloj ŝveligis. Poste ŝi ne plu povis sin lasi tiel fari.

Hu Juen-kuej estis diligenta kaj honesta kamparano. Ili kunvivis tre harmonie. Dum la okupado de la japana invadarmeo li estis devigita de bienulo, kiu estis centfamiliestro, labori por la japanaj diabloj. Li laboris sensalajre, sed ankoraŭ ricevis frapojn, kiam ili malkontentis pri li. Depost ŝia sveno en la kampo dum la somero, lia sano jam despi malboniĝis. Ĉi-foje li revenis hejmen preskaŭ rampe. Lia tuta korpo estis trempita en sango. Li Aje vendis objektojn por kuracigi lin, kies korpo pusis, buŝo sputadis sangon kaj sur kies vundoj rampetis vermoj. Sed fine, en iu vespero li elspiris sian lastan spiron.

Post pli ol 30 jaroj da laborado la geedzoj aĉetis kompatinde malgrandan bienon. Por pagi al kuracisto kaj aĉeti ĉerkon, ŝi pruntis iom da greno de bienulo. Post la enterigo de ŝia edzo la senkora bienule ekspluatita ŝin per procentego de geometria progresio, ĝis ŝi tute senhavigis. Ekde ŝia 8-jara aĝo ŝi jam laboris kiel sklavoj, kaj nun post 45 jaroj, al ŝi restis nur du kabanaj ĉambroj el herbaĉo, forno el 3 brikoj kaj la sorto de almozulino.

Si ekkomprenis

Milite, Hunan-Provinco estis liberigita jam en la aŭtuno de 1949, sed Li Aje, kiel centoj kaj miloj da kamparanoj en la Centra-Suda Regiono, ekspiris libere nur de la dua duono de la pasinta jaro. Dum la malltigo de la ter-lupezo kaj procento, ŝi reprenis 300 litrojn da greno kaj 4 argentajn dolarojn da procento de la bienuloj. Pli grave tamen estis, ke ŝia pozicio en la vilaĝo nature altiĝis: ŝi povis esti dungata rikolti kotonon kaj ŝpini. Pasintjare ŝi eĉ faris por Man-ze kaj Liaŭ-ĉen novajn vestaĵojn.

Kiam la laborgrupo de agrara reformo ĵus atingis Ŝinĉuang-vilaĝon, same kiel aliaj malriĉaj kaj dungitaj kamparanoj kiuj estis subpremataj la plej longe kaj forte, Li Aje ne tuj aktiviĝis. En ŝia penso ŝi ankoraŭ kredis la fatalismon "ĉion destinas la sorto", kiun fabrikis la regantaj klasoj de la pasintaj epokoj. Unuflanke ŝi malamegis la bienulojn, sed aliflanke ŝi timis ke revenus la tempo de sanga 1927 kiam la bienuloj restaris sian regadon kaj venĝe mortigis la kamparanojn. Komence ŝi ankoraŭ dubis ĉu la Kamparana Asocio akceptus ŝin almozulino, opiniante ke la mondo apartenas al la "nobluloj", sed ne al honestuloj. Ŝi ankaŭ ne bone komprenis la problemon: ĉu la bienuloj vivtenas la kamparanojn aŭ la kamparanoj la bienulojn. Tuj kamparanoj eĉ pensis: Prezidanto Maŭ jam volas helpi nin kamparanojn, kial li ne presigis monbiletojn por aĉeti kaj distribui al ni la teron de bienuloj?

Tiam la riĉaj kaj mezriĉaj kamparanoj en la vilaĝo montriĝis iom pli aktivaj, almeaŭ ili komprenis kion signifas la agrara reformo, tion leginte jam antaŭe en ĵurnalo. Kaj la lakeoj de la bienuloj despi sin entrudis tien kaj reen kiel kobitoj. Sed la laborgrupo de agrara reformo ĝuste intime rilatiĝis kun kamparanoj, kia Li Aje, kun ĉifona vesto, malpura domo kaj malsprita parolo, kaj sin bazis sur ili. Iu kadro vizitis la hejmon de Li Aje, helpis sin labori kaj parolis kun ŝi. Tio fine eliris el ŝi sian malfelican travivaĵon. Plorante ŝi rakontis, kaj la kadro ankaŭ ne povis deteni sin de ploro.

Nun Li Aje eksciis, kiu mortigis ŝiajn edzojn kaj infanojn; kaj ke la bienulo ne estas destinita de la sorto vivi lukse, sed pro tio ke la bienulo deprenis 60 hektolitrojn el la 70 hektolitroj da greno kiun Hu Juen-kuej rikoltis ĉiujare.


De la politika propagando ŝi ankaŭ ekkomprenis, ke jam renversigis por ĉiam Kuomintang kiu terure ekspluatita la ĉinan popolon jam neniam povos reveni. Ŝi ekkonsciis ke la sorto estas tenata en la propraj manoj de la malriĉuloj; se la bienuloj ne estos faligitaj, Man-ze kaj Liaŭ-ĉen ankaŭ ne povos vivi bone.

Post la klarigo de ŝia penso, mi eĉ malgranda kaj malgrasa tui-

(daŭrigo sur p. 36)



Nun ankaŭ maljunulino partoprenas interhelpan grupon por ŝpinado



LA BATALO DE 2,200,000 KAMPARANOJ KONTRAŬ NATURO

— Raporto pri subjugado de la Huaj-Rivero —

Popolo leviginta havas plenan fidon ne nur pri la frakaso al ĉiaj imperiistaj intrigoj, sed ankaŭ pri la konkero de natura forto, kies kaprico ofte kaŭzas katastrofon al la vasta popolamaso. Tion plene manifestas la batalo de la ĉina popolo kontraŭ inundo de la Huaj-Rivero (淮河).

En la historio la ĉina popolo estis konstante minacata de la inundegoj de la grandaj riveroj. Unu el ili estas Huaj-Rivero, kiu, dum la reakcia regado en la lastaj cent jaroj, kaŭzis jam 15 katastrofajn inundojn.

Huaj estas unu el la ĉefaj riveroj en Ĉinio. Ĝi najbaras norde kun la Flava Rivero (黄河) kaj sude kun la Jangze-Rivero (揚子江). Okcidento ĝi estas limigita de la montaroj Funiu (伏牛山) kaj Tungpaj (桐柏山) kaj oriente etendiĝas ĝis la maro. La tuta baseno de la Huaj-rivero inkluzivanta siajn branĉojn ampleksas 260,000 kvadratajn kilometrojn, t.e. ok oklojn pli granda ol Nederlando.

Tiu ĉi regiono havas tre ritan agrikulturajn produktojn. Abundas rizo, tritiko, fabo, milio, maizo, arakido, sezamo kaj aliaj. Entute 55,000,000 loĝantoj troviĝas ĉi tie kaj 160,000,000 muoj da kulturata tero sterniĝas sur la granda ebenajo. Sed malfeliĉe la popolamason en tiu ĉi regiono konstante minacas inundegoj kaj sekecoj, kiuj signifas al ili malsaton kaj morton. La du lastaj inundoj okazis en 1931 kaj 1950. Tiam estis inunditaj 77,000,000 kaj 40,000,-

000 muoj da kulturata tero respektive.

Estis ambaŭ naturaj kaj politikaj kaŭzoj por tiaj ofte ripetataj katastrofoj. Geografie la supra parto de tiu baseno estas borderata de montregionoj en la norda, okcidenta kaj suda flankoj. Kaj malsupre la tutan basenon formas granda ebenajo, kiu iom post iom malaltiĝas de okcidento al oriento, sed la dekliveco pli kaj pli malgrandiĝas. Pluvsezono en la tuta regiono koncentriĝas en kelkaj semajnoj de julio kaj aŭgusto. Tio kaŭzas malfacilon por rapida deflueo de la pluvakvo koncentrigita en la rivero.

Kio pli katastrofa estas la en-trudiĝo de la Flava Rivero en la malsupran parton de Huaj-Rivero kaj ĝiajn branĉojn. Tio okazis jam du fojojn. Rezultato de la unua fojo en 1495 estis la obstrukciĝo de la malsupra parto de Huaj-Rivero kaj tio devigis ĝin flui al la maro tra la Granda Kanalo (運河) kaj Jangtze-Rivero. La dua fojo okazis en 1938. Tiam la Kuomintang-aj banditoj pro konsideroj militaj forkondukis la Flavan Riveron flui denove suden entute ignorante la vivojn de miloj kaj miloj da kamparanoj. Ekde tiam la riverujo de Huaj-Rivero kaj ankaŭ multaj el ĝiaj branĉoj estis refoje forrabitaj de la Flava Rivero, kiu alportis tiom da feĉo al la riverujo kaj rompis grandan parton de la estintaj digoj. En 1946 la Flava Rivero revenis al sia norda vojo, sed la riverujoj preskaŭ ebeniĝis kun la digoj. Tial inundo en la pluvsezono fariĝis jam neevitebla.

Giganta kaj senespera ŝajnas esti la batalo por bridi Huaj-Riveron sub tiaj kondiĉoj. Tamen la ĉina popolo sub la gvido de la Ĉina Kompartio nenion timas. Jam en la unua jaro de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko estis ellaborita kompleta projekto por konkero por ĉiam la inundo en la tuta lando. Tio pri la Huaj-Rivero estas unu el la ĉefaj partoj.

Kio planita, tio farata. Laboro por bridi la Huaj-Riveron inkluzive la branĉojn al trankvila fluo kaj utilo al la popolo komenciĝis jam ekde lasta novembro kaj en tiu ĉi jaro ĝi antaŭen marŝas en pli granda skalo. Mobiliziĝis en la baseno komence de la printempo ĉirkaŭ 1,500,000 kamparanoj kaj nun pliiĝas jam ĝis 2,200,000.

Kiel dirite, unu el la ĉefaj kaŭzoj de inundo venas el tio, ke la malsupra parto ne povas akcepti la tutan

kvanton da akvo de la supraj branĉoj. Tial en la supra parto la batalo estas centrigitita en konstruado de akvokonservujoj. Nun ĉe montgorgoj apud la riveroj Jing (穎), Hung (洪) kaj Ju (汝) la tri ĉefaj branĉoj de Huaj-Rivero en la okcidenta parto 4 novaj akvokonservujoj estas konstruataj kaj 4 lagoj ĉe la rivero estas dragataj kaj larĝigataj por helpi la akvokonservon. Kaj ĉe la malgrandaj branĉoj estas 15 nove faritaj lagoj kun transriveraj digoj. Ili ne nur servas kiel akvokonservujoj sed ankaŭ multe helpas al la irigacio.

Iom malsupre al la sudoriento giganta projekto por akvokonservujo estas efektivigata. En Huoĉiu (霍邱) iom okcidente de Ĉengjangkuan (正陽關) en norda Anhuej (安徽) estas serio da lagoj 100 kilometrojn laŭlonge de Huaj-Rivero. Nun pli ol 200,000 kamparanoj entreprenas dig-konstruadon kaj -riparon ĉirkaŭ la lagoj. Ankaŭ kluzoj ĉe la enirejoj de la lagoj estas konstruataj. Kaj trans la Huaj-Rivero oni konstruas grandan transriveran digon longan je 533 metroj. Laŭplane 5,000,000,000 kubmetroj da akvo estos konservataj per tiu ĉi arango. Laboro en tiu ĉi parto estas la ĉefa

Supre la bildo montras la dragan laboron ĉe iu branĉo de la Huaj-Rivero

punkto de la printempa programo por la kontraŭinunda batalo ĉe Huaj-Rivero. Pli ol 7,000,000,000 kubmetroj el la superflua akvo estos retenataj. Tio almenaŭ garantias la rikolton de pli ol miliono da hektaroj.

Pli malsupre en la granda ebenajo de Nord-Anhuej preskaŭ tri kvaronoj de miliono da kamparanoj batalas laŭlonge de la rivero. Ili pli altigas la digojn je pli ol 9 metroj kaj konstruas novajn, kie la digoj ruiniĝis en la lastajara inundo. Tiu ĉi laboro estas akordigita kun la projekto en la supraj partoj, ke la digoj povu protekti la agrojn laŭ la bordoj ĉe kiam la akvonivelo atingas la rekordon de 1931, la plej alta en la lastaj cent jaroj.

Ĝisfundan solvon ĉe la malsupra parto oni ankoraŭ devas iom atendi ĝis la dua paŝo. Nun la laboro estas koncentrigita en la dragado de la nuna fluejo, riparo kaj altigo de la digoj laŭ la lagoj Paujing (寶應湖), Kaŭjoŭ (高郵湖) kaj Ŝaŭpaj (邵伯湖) laŭ la Granda Kanalo. Milionoj da kubmetroj da terlaborajo estas farataj. Per ili oni intencas garanti la rikolton de miliono da hektaroj oriente de la lagoj.

La nordaj branĉoj de la Huaj-Rivero precipe la riveroj Suj (淮河)

La Vilaĝo Ŝikoŭ Fariĝas la Meko por

Malgranda vilaĝo Ŝikoŭ (西溝村) kaŝata inter la montoj de Suda Ŝansi-Provinco (山西省), estas nun famkonata loko. Ĝi estas la hejmo de labor-heroo Li Ŝun-ta (李順達) kaj liaj interhelpaj grupoj, kies klopodado kaj elpensemo transformis ĉi tiun iam solecan vilaĝon en lokon de abundo.

Kamparanoj de mejloj ĉirkaŭe svarmadas tien por vidi kiamaniere Li Ŝun-ta kaj liaj grupoj laboras, kaj terkulturistoj tra tuta Ĉinio legados en tagjurnaloj raportojn pri iliaj metodoj.

La Vilaĝo Ŝikoŭ jam komplete sanĝiĝis ĝis nerekonbleco dum la pasintaj jaroj. El amaseto da maizotigoj kaj terkabanoj ĝi fariĝis bela loko kun dekoj da novaj domoj kaj unu lernejo. Ĝiaj iam rokaj montdeklivoj sanĝiĝis en kulturataj ŝtupaj parceloj, dum vicaj post vicaj da arboj kovras la antaŭe kalvajn montojn najbarajn. Ŝafoj kaj bovoj sin paŝtadas kie vagadis antaŭe malsataj lupoj.

Ĉio ĉi tio estas la ellaboritaĵo de Li Ŝun-ta kaj liaj interhelpaj grupoj. Li Ŝun-ta, kiu forlasis sian hejmon en Honan-Provinco (河南省) en 1932 pro malsatego kaj venis al la Vilaĝo Ŝikoŭ, estis unu el la unuaj


kamparanoj en la Tajhang-Monta Regiono (太行山區), kiuj organizis interhelpajn grupojn por prilabori la kampon.

Blokadite de la japanoj kaj atakite de senpluveco, la Tajhang-Monta Regiono estis ĉiam en malriĉeco kaj manko dum la unuaj jaroj de la kvina jardeko. Sur la agroj mankis laborantoj, ĉar granda nombro da viroj jam ekprenis armilojn kontraŭ la japanaj hordoj. Prezidanto Maŭ Ze-tung alvokis la kamparanojn venki la malfacilojn per la organizo de interhelpaj grupoj. Li Ŝun-ta respondis senprokraste.

La unua interhelpa grupo de Li formiĝis en 1943. En la komenco ĝi havis nur ses membrojn, ĉar la aliaj kamparanoj estis malinklinaj iel rilatiĝi kun tia "neaŭdita aventuro." Sed la malgranda grupo ekplugis peceton da tero kaj espezis grandan sumon per dehakado de brulligno. La nova aventuro pruviĝis sukcesa, tial aliaj vilaĝanoj ekinteresiĝis pri ĝi kaj el la dudek familioj de la vilaĝo aliĝis dek ses kaj tri interhelpaj grupoj estis formitaj. Ili kune plugis siajn kampojn kaj malfarmis aliajn dek hektarojn da nekulturita tero, el kiuj kvindek



Kadro laboras kune kun kamparano en la akvo



Feliĉa Vivo de Laboristinoj

De la lasta jaro ĝis nun, la laboristinoj de nova Ĉinio enskribis brilan paĝon en la historio de la liberiga movado de ĉinaj virinoj. En la patrolanda konstruado, kune kun la laboristoj la laboristinoj pene konkeris la malfacilojn de material-provizo kaj la bombado, blokado kaj detruoj de la Usona kaj Ĉiangkaj-ŝek'a banditaro, kaj fine rapide revigligis kaj prosperigis la produktadon.

La ŝpin- kaj teks-industrio, el kies gelaboristaro pli ol duono estas laboristinoj, estas unu el la plej grandaj industrioj de Ĉinio. En la jaro 1950 la produktokvanto de ŝpinaĵo jam preskaŭ proksimiĝis al la plej alta antaŭmilita produktokvanto (97 procentoj de la produktokvanto de 1930j.). En la pasintaj oktobro kaj novembro, la tutlandaj geŝpinistoj sturme produktis la 20-gaŭĝan* ŝpinaĵon, kaj kun ekstra produktokvanto plenumis la taskon kiun la registaro donis. Pro tio ili ricevis premion de 500 milionoj da juanoj de la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro. La Dua Ŝtata Ŝanhaja Teksejo en la sturma produktado de 20-gaŭĝa ŝpinaĵo produktis 1.2788 funtojn po ŝpindelo en 20 horoj kaj kreis la plej altan rekordon en la tuta lando. En la patriotisma produkta konkurado por kontraŭbatali Usonon kaj helpi Koreion, la laboristinoj plialtigis la kvanton kaj kvaliton de la produktadoj persiste laborante sur sia posteno. Sub la fervora stimulo de laboristino "Granda Lokomotivo" Pan Ŝiu-ĵing (潘秀英), meze de la pasinta novembro la Sepa Mukdena Kaŭĉukfabriko jam plenumis la tutjarian produktan taskon de ŝuoj vatitaj kaj ŝtofaj. Kaj la procentoj de perfektaj produktaĵoj altiĝis ĝis 98.

Nur en Nordoriento estas jam 1,849 laboristinoj kiuj kreis novajn rekordojn. El la 507 unuaklasaj labormodeloj de la 3 fabrikoj en Zinan (濟南), la ĉefurbo de Ŝantung-Provinco (山東省), sin trovas 297 laboristinoj. Tiuj laboristinoj volonte iris labori sur la fronto en Koreio, aŭ sub la bombado de Usonaj aeroplanoj persiste laboris riskante sian vivon. Aŭto-konduktorinoj An Kuej-je (安桂葉), Ĉang Ŝu-sian (張淑賢), k.a. en Port-Arturo kaj Dajren volonte iris al Koreio por trafika laboro. Telefonistino Vang King-pin (王靜彬) en Antung (安東) gvidis la tutan laborantaron persisti en sia laboro sub la bombado de Usonaj aeroplanoj. Ili diris: "Se nur ni ankoraŭ spiras, ni nepre garantias la normalan funkciadon de telefono kaj la sekurecon de trafiko."

En nova Ĉinio, la politika pozicio de laboristinoj jam multe altiĝis. Multaj laboristinoj partoprenas registaran laboron. De la Tutlanda Popola Politika Konsilia Konferenco ĝis la popolaj reprezentantaj konferencoj de diversgradaj registaroj, en ĉiuj tiuj konferencoj ĉeestas laboristinaj reprezentantoj. Tang Kuej-fen (湯桂芬), laboristino de Ŝanhaja ŝpinaĵo ne nur estras la Laboristinan Fakon de Ŝanhaja Federacio de Laboristoj, sed ankaŭ estas konsilano kaj vicestro de la Labora Departemento de la Milita kaj Politika Konsilo de Orienta Ĉinio. Jan Kinfen (閻金芬), laboristino de Taŝing Ŝpinaĵo (大興紗廠) en Ŝeĉiaĉuang

(石家莊) estas ankaŭ elektita konsilano en la loka registaro. Multaj laboristinoj estas promociitaj al kadroj de fabrika administrado aŭ teknika direktado. En la Oka Ŝtata Ŝanhaja Teksejo promociiĝis al geoficistoj 19 gelaboristoj, el kiuj 7 estas laboristinoj. Tiuj laboristinoj nun jam okupas sin en la oficoj de administranto kaj fabrikestro. En trafiko multaj laboristinoj oficas kiel direktoroj de fervoja pasaĝertrafiko, estroj de pasaĝervagonaro, kaj estroj de vagon-irado, oficisto kaj gvidanto de maŝinejo en fabriko. Laŭ nekompeta statistiko en Nordoriento estas promociitaj 2,824 laboristinaj kadroj en la lastaj tri jaroj.

La laborkondiĉoj de laboristinoj jam pliboniĝis, kaj la bonzorgo al ilia vivo ankaŭ ampleksiĝas iom post iom. Efektiviĝis la principo "sama salajro kontraŭ sama laboro" por ambaŭ laboristoj kaj laboristinoj." Plenumiĝis en grandaj fabrikoj ankaŭ la arango ke je akuŝo laboristino ricevas 56-tagan libertonon kun plena salajro. En la fabrikoj en Mukden, Harbin (哈爾濱), kaj Ŝansi-Provinco (山西省) estas starigitaj regulo ke laboristinoj gravediĝintaj pli ol 7 monatojn ne laboras dumnokte. Kaj en Ŝanhajo, Tienzin (天津), Ĉingtaŭ (青島), kaj Nord-oriento multaj fabrikoj ankaŭ faras fizikan ekzamenon al la laboristinoj.



La traktoristinoj zorge kontrolas la maŝinojn

arangaĵojn por virina kaj infana higieno, kaj fondis sanitarajn centrojn por virinoj kaj infanoj. En multaj fabrikoj en kiuj laboras multaj laboristinoj, oni dungis ginekologojn, akuŝistinojn, kaj establis infanvartejojn. Laŭ statistiko, en Ĉinio nun estas 286 fabriakaj infanvartejoj kiuj vartas 11,962 infanojn, forigis multajn genojn de la laboristinoj, kaj ankaŭ gubernas por nova Ĉinio sanan duan generacion.

La laboristinoj de nova Ĉinio ĝuas la kulturan vivon kiun ili neniam ĝuis antaŭe. En Port-Arturo kaj Dajren 8,640 (94.3%) el la 9,115 analfabetaj laboristinoj partoprenis en lernado. Pro sia diligento multaj laboristinoj elektiviĝis lernomodeloj. La pli ol 40-jara laboristino Vang Lin-ti (王林弟) en Ŝanhaja Ŝpinaĵo diligente lernas kulturon post la liberiĝo, kaj estas elektita kiel speciala lerno-modelo. Ŝi ĉeestis la tutlandan kongreson de laborista kaj agrikulturista edukado kaj ricevis aprobajn vortojn da

kaj Sifej (西肥河), kies riverujoj estis ruinigitaj de la Flava Rivero estas ankaŭ riparataj kaj dragataj. Tio donos protekton almenaŭ al 160,000 hektaroj da agroj.

Giganta estas la skalo de la printempa laboro. La tuta laboro konsistas el 1,800 kilometroj de digkonstruado, 770 kilometroj de riverdrago, 100,000,000 kubmetroj da terlaboraĵo kaj 47 arkaĵoj kaj kluzoj. Kaj tio ankoraŭ ne inkluzivas la grandajn transriverajn digojn longajn je 1,470 metroj. Komparante kun ĝi la kreo de Suez-a Kanalo fariĝas jam nemenciinda.

Por bone efektiviĝi la projekton bridi la Huaj-Riveron centra stabejo estis starigita en norda Anhuej. Ĝi estas interligata kun la ceteraj punktoj per retoj da telefonoj. Regulajn raportojn ĝi ricevas kaj tial ĝi povas bone kompreni la tutan situacion kaj doni ĝustatempan instrukcion al la lokaj batalantoj.

La granda armeo de la kampanoj apud la rivero laboras kun granda entuziasmo kaj firma kredo al la venko super la kaprica rivero. Laŭlonge de la bordoj flirtas en brizo sennombraj ruĝaj flagoj, sub

kiuj la 2,200,000 kampanoj konkuras unu kun la aliaj en laborrapideco kaj eltrovo de novaj labormetodoj por ke ili povu efektiviĝi la printempan programon pli frue ol la difinita tempo. Nokte la elektralampe prilumataj loĝejoj de la granda armeo brilas laŭ la bordoj kvazaŭ nove starigitaj vilaĝoj. Sanitaraj stacioj estas starigitaj por la laborantoj. Ankaŭ la dramludaj trupoj rondiras de loko al loko por prezenti al ili teatraĵojn kaj ceterajn amuzajn programojn. Organiziĝas inter ili ankaŭ lernaj grupoj por daŭrigi la batalon kontraŭ analfabeteco kaj informiĝi pri la kuran-taj eventoj.

La nuna laboro estas nur la komenco de la tuta projekto kontraŭ inundo de Huaj-Rivero. Pli grand-skala drago de la riverujo komenciĝis en la lasta duono de la kuranta jaro. Kiam efektiviĝos la tuta plano du aŭ tri jarojn poste, tiam la 150-jara katastrofo, kiun la reakciaj reĝimoj dum cent jaroj ne povis konkeri, foriĝos por ĉiam, 160,000,000 muoj da agroj estos savitaj kaj 55,000,000 popolanoj en la baseno vivos ĉiam feliĉe kaj abunde.

Honfan

Kampanoj

tunoj da terpomoj estis rikoltitaj. En la Vilaĝo Ŝikoŭ manko de manĝaĵo fariĝis jam estinta kaj interhelpaj grupoj organizitaj de la vilaĝanoj en la ĉirkaŭaj distriktoj pli kaj pli multigiĝis.

Dum la sekvantaj jaroj, multaj viroj foriris al la fronto, kaj Li Ŝun-ta sukcesis iel venigi en siajn grupojn virinojn, kiujn malnova kutimo malpermesis labori sur la kampo.

Post la kapitulaco de Japanio, pli multaj konsilioj kaj helpo estis riceveblaj de la registaro. Plibonigitaj semoj ekalvenis. Ĉi tio kune kun lia nelacigebla serĉado por novaj terkulturaraj teknikoj ege pligrigis la agroproduktaĵojn. La maizo-rikolto preskaŭ duobliĝis pro la enkonduko de hibridaj semoj.

En la jaro 1950, la rikolto de la Vilaĝo Ŝikoŭ estis jam 75% pli alta ol la antaŭmilita, dum la tero kulturata ankaŭ plivastigis tre multe. La vilaĝanoj, kiuj sin nutradis ĉefe per brano kaj sovaĝaj vegetaĵoj por



Li Ŝun-ta kun sia plugilo

ses monatoj dum la jaro, nun havas grandan kvanton da superflua greno por forvendo. Ĉiuj prosperiĝas. Li Ŝun-ta, kiu havis nenion krom la vestoj sur sia dorso kiam li alvenis al ĉi tiu dezerta loko antaŭ 19 jaroj, havas por sia familio de 12 personoj domon kun 11 ĉambroj, tri hektarojn da bona agro, kvin bovojn, 34 ŝafojn, kaj grandan parcelon da forsta tero.

Lastatempe, la labor-heroo deklaris al ĉiuj ĉinaj kampanoj ke liaj interhelpaj grupoj levos sian rikolton 108% pli alten ol la antaŭmilitan. Li defiis ĉiujn kampanojn starigi egalajn celadojn.

Ci-pao Nin

Ŝe Fang-ju (石方禹)

La Plej Forta Voĉo De La Paco

K-do Ŝe Fang-ju, la verkinto de tiu ĉi poemo, ne estas profesia poeto. Nun li estas redaktoro de "The Shanghai News", anglalingva ĵurnalo en Ŝanhajo. Li naskiĝis en Fukien-Provinco (福建省) en 1926. En la jaroj de 1946 ĝis 1948, kiam li studis en Janking-Universitato (燕京大學) en Pekino, li aktive partoprenis en la tiaman studentan movadon kaj anigis al la glora Ĉina Kompartio. Dum la batalo kontraŭ malamikoj li verkis nemal multe da agitemaj poeziaĵoj kaj ricevis vastan aprobon de la studentoj. Tiu ĉi verko estas la unua longa poemo kiun li verkis post la liberiĝo de Ĉinio. Ĝia originalo aperis en vol. III, n-ro 1 de "Popola Literaturo", la plej granda literatura gazeto en popola Ĉinio.

I

La voĉo el Stokholmo
estas la plej forta voĉo en la mondo!
Ĝi kvazaŭ uragano
de la bordo de Balta Maro
levas trombe sablon el Gobia fundo.

Ni, Donbas-ministaro,
PLA¹-soldatoj en Ĉinio,
negrosklovo en Sudameriko
aŭ fiŝistoj sur norvega maro,
ni estas simplaj homoj.
Niajn nomojn
la magnatoj de Wall-strato
ja aŭdis neniam,
sed sur la pacalvoko
ĉiu el ni subskribas
nomon sian.

Ni kun adnomonaco fingra je ilia nazo
malpermesas ĉerpi per obusingo
nian freŝan sangon

por soif-estingo.

Ni malpermesas uzi
Misisipiajn kamparanojn
por ataki
Ukrajnajn kolhozanojn.

Ni estas simplaj
sed neatekblaj homoj,
ĉar nia nomo
estas

Popolo!

Ni estas en la mondo
la plejmulto absoluta,
kaj nia voĉo
la plej forta voĉo en la mondo tuta.
Pacon ni ne almozas kun plortono,
sed militi malpermesas
per ordono!

II

Malpermesu
al la rabistoj en frako
kaj murdistoj kun kruco surbruste
veti en hazardludo homajn vivojn kaj feliĉon
aŭ per sango mezuri sian riĉon!
En Pentagono en Vaŝingtono
ilia militmapo
mencias jam Pacifikon
kiel enlandan lagon de Usono,
kaj faras Japanion kaj Filipinojn
ĝiaj aerodromoj.
Ili intencas ekdetruigi morgaŭ
la tutan mondon per fajregoj
kune kun ĝiaj ĝardenoj,
bibliotekoj,
kaj kindergartenoj².

Ili volas vidviniĝi
niajn amatinojn.
Kaj la patrino mizera
larmos kordolore
kiam ŝi aŭdas
la balbutantan orfon
voki sian paĉjon plore.

Malpermesu al ili,
malpermesu ĉiujn ĉi krimojn!

Usono
estas tiu ĉi malica lando.
Ho, kie estas viaj Lincoln kaj Jefferson?
Mi legis la verkojn kiujn vi donis al la mondo:
la *Deklaracio de Sendependeco*,
la romanoj de Mark Twain,

la Whitman-verkaro poezia.

Iam mi pensis stulte:
unu kapitano falis,
nepre leviĝos alia.

Sed, Usono,
kiam mi metas apud *Herbofolioj*
femurbildojn de Hollywood-aj filmparadoj
aŭ la *Deklaracion de Rajtoj*
apud Truman-paroladoj,
kia degenero!
Mi aŭdas ke viaj prapatroj
ploras sub la tero.



Ho, Usono!
La torĉo en la mano de Libero
kiun vi starigis ĉe l' bordo de Atlantiko
estingiĝis jam.
Viaj verdaj herbejoj
estas stampitaj de piedsignoj de Satan'.
En viaj hospitaloj estas kulturataj
mortigaj bakterioj,
homĉasajn hundojn dresas
viaj menaĝerioj,
kaj per invento de mortigiloj
konkuras viaj laboratorioj.
Viaj gazetoj aperigas bildojn de
klubdancistinoj
kiuj allogas virojn al rekrutiĝo per kisoj,
dume sur foraj insuloj en Pacifiko
soldatoj, kiuj eskapis morton dum la Dua
Mondmilito,
apogante kapon sur ŝtono glacia
sonĝas dolĉan sonĝon pri returno al Kalifornia.

Ho, Usono,
tio estas malpermesita!
la kantoj de Robeson peze resonas,
kaj via popolo vin admonas.
Antaŭ la kasejo de bankoj
staras dommastrinoj
kun malbone nutritaj suĉinfanoj.
Banknotojn ili ja ne posedas.
Kio pluas sur vin en inundo,
estas sange kaj larme skribitaj sloganoj.
Ili ne pagos imposton
por atombombo kaj homĉasa hundo.

Iliaj filoj

ne povas morti sur kampo de fremdlando.
Mi vidas kajlaboriston sur telegrafa stango
alte levanta la pacflagon sur Novjorkaj stratoj.
Kaj en miaj oreloj resonas ankoraŭ la ploro
de l' virino,
kiu ĵetis sin kape al la kolono de Blanka Domo
aŭdante ke l' armeo estas sendita al Koreio
kaj petegis Truman'on
redoni al ŝi la solinfanon.

Usono!

Nepre eksplodos via vulkano,
se Truman kaj Marshall
insistas je sia krimago.
Ministoj rampos el siaj ŝaktoj
kun dinamito kiun ili uzas en minejo,
fervojoj laboristoj veturigos ĉiujn lokomot-
ivojn al Vaŝingtono,
soldatoj reen marŝos de la fronto,
negroj frakasos la elektroseĝojn,
kaj dommastrinoj kuros el la kuirejo.

Se hodiaŭ eksplodus milito,
ho Usono,
jam morgaŭ Blankdomon kaj Pentagonon
atakos via civito,
ĝuste kiel rusoj trarompis la pordegon de l'
Vintra Palaco
dum la lastaj tagoj de la Unua Mondmilito.

III

Muĝas vento,
furiigas la maro,
Pacifiko estas plena de kaŝitaj rifoj.
Usono, direkton ŝanĝu via ŝipo
antaŭ la tumulto ondaro!
La Tarukaj herooj
jam fosis por vi tombon
en Filipina kokos-arbaro,
apud la francoj
vian kadavron enterigos
Ngujen Ĝiap kaj Ho Ĉi Min,
kaj la lafo de Fujijama
trarompas sian negocaĉon
kaj cindrigos vin.

Malpermesite! Malpermesite ien ajn trud-iri!
Se vi kuraĝus
invadi Ĉinion,
tie ĉi kvarcent sepdek milionoj da popoloj
pretas vin mortbati kiel vulpon
kaj por militakiraĵo
vian felon
deŝiri.

La fajro kaŭzita de Truman
estas bruliganta la grenkampojn de Koreio.
En koreaj valoj freŝas ankoraŭ la sango hieraŭa
kaj ilin inundas jam sango nova.
Kiam forflugis Usonaj aeroplanoj
infano rampas sur la sangumita korpo de l'
patrino
kaj suĉas la sangon fluetantan
el la mamoj.

Apud Han-Rivero
inter kruteĝaj montoj
koreaj popoloj
altorentas kiel flusondoj,
kaj partizanoj
eksaltas el herbaro
celante al vi
pafadon sian,
kaj per fosio batas kamparanoj
kapon vian.

Popolo—
 por tiu ĉi nomo
 neniam estis loko
 en Truman-militscienco,
 sed estas ja tiu sama popolo,
 kiu, ĵus hieraŭ subskribinte
 sian nomon sur la pacalvoko,
 ekprenas hodiaŭ aŭtopafilon
 kontraŭ malamika provoko.
 Por Truman du solaj vojoj:
 kapitulaci antaŭ Paco
 aŭ
 klini sin ĉe l' militkrimula tribunalo.
 Al la tuta mondo, jen de la popolo
 solena proklamo!
 Kiu ne aŭdis tiun ĉi voĉon
 enterigos sin
 en la memfarita flamo.

For militon!
 Sur la kajo de Sanfrancisko
 bruegas la adiaŭ-plorado de edzinoj al edzoj,
 de patrinoj al filoj.

For militon!
 El dormo vekiga ankoraŭ infanoj
 de la fajfado de Hitleraj plunĝo-bombadiloj.

For militon!
 For de Okcidenta Eŭropo
 la Unuigita Cefstabo
 kaj la Marshall-Plano kanibala!

For de Koreio
 ĉiuj Usonaj soldatoj
 kun la ŝtelita el Lago Sukceso
 flago de l' Unuigita Naciaro!

For de Tajvan
 la Sepa Ŝiparo!

For militon!
 Venas krioj de Usonaj kaptitoj
 el korea disaŭdiga stacio.
 Forkuras tutpelotone kaj tutrote
 Usonaj soldatoj en Japanio.

For militon!
 pro la feliĉa vivo de sennombraj familioj,
 pro la baloj de sabat-vesperoj,
 pro niaj lernejoj kaj teatroj,
 pro niaj kulturitaj teroj
 kaj industrioj!

For militon!
 ke sennombraj Tanja-j daŭrigu lernadon en
 naŭa klaso.
 ke Liu Hulan vivu ĝis nun kaj fariĝu
 labormodelo,
 ke PLA-soldatoj laboru per plugilo aŭ martelo.

For militon!
 Tio kion la popolo elektas
 ne estas skarabo de Kolorado,
 sed traktoro kaj grenkulturado.

For militon:
 Truman kaj Churchill,
 ili tremu antaŭ la plej forta voĉo de la paco!
 Barbaraj persekutoj
 ne povas kaŝi ilian internan timon.
 Antaŭ Ku Klux Klan kaj ĝendarmoj,
 antaŭ tankoj kaj larmiga gaso,
 pabatalantoj
 levu pli alten vian standardon
 por savi la mondpacon!

Ho, kamarado McCarthy en Novjorko:
 kiam via okulglobo estis elfrapita
 kaj vi kuŝis en hospitalo,
 popolanoj murmuris vian nomon,
 ĉar vi estas ĉampiono de la pactendaro.

Ho, lernantino sur Damaska strato!
 kiam vi estis arestita de policanoj,
 la pacalvokiloj en viaj manoj
 transkuris en pli multaj manoj.

Patrinoj en Vieno!
 kiam vi laŭte kriis por paco
 antaŭ la Usona Ambasadorejo
 kaj falis en policistajn manojn,
 ĉu vi aŭdis ke la patrinoj en Parizo

antaŭ samspeca konstruaĵo
 kriis la samajn sloganojn?

Pacgvidantoj en Angora!
 kiam vi estis turmentitaj en milittribunalo,
 pacorganizoj en urboj kaj vilaĝoj de Turkio
 prosperiĝis kiel printempa floraro.
 Pabatalantoj!
 batalu kun pli heroo spirito,
 kaj je la nomo de paco
 deklaru militon kontraŭ milito!

IV

La okuloj de l' popoloj
 turniĝas al Sovetlando,
 kvazaŭ post granda sekeco
 oni vidus pluvarkon sur la ĉielrando.
 La standardo de Sovetio
 ardigas la batalvolon de milionoj kaj milionoj;
 la sonorilo de Kremlo
 firmigas la kredon de ĉiuj pacsoifantaj homoj.
 Memorigu la militagentejn la lecionoj en his-
 torio.

Sur tiu malnova tero
 kiel tajdo alfluis
 la armeo de la juna reĝo de Svedio,
 tamen la malvenko de Karlo la Dekdua,
 kiel tajdo deflua
 lasis ĉie post si konkojn,
 la kadavrojn de la granda armeo.
 Sur la verto de nubskrapaj Alpoj
 Napoleono foje staris,
 tamen sur la nekovrita tero de Rusio,
 lia montsimila armeo
 en polvojn disfalis.

Ho, tiuj malnovaj historioj
 estis forgesitaj de Hitler,
 sed la Hitleran malvenkon
 ja freŝe memoras ĉi generacio.
 Hodiaŭ la Sovetiaj herooj
 staras fronte de l' pacfronto.
 Kiuj ajn kuraguŝi ataki el oriento,
 kiel ties tombstonoj servos la Siberia arbaro;
 kiuj ajn kuraguŝi ataki el okcidento,
 estos enterigitaj en Balta Maro.
 La teron de Sovetio
 saturis la sango de invadantoj
 kaj ankaŭ la sango de propraj herooj gefiloj.
 La intervenantoj el dudek kvar landoj
 superversis la nove naskitan respublikon
 per pluvego el ŝtalo kaj fajro,
 la faŝistaj banditoj superversis ankaŭ
 la potencon respublikon
 per samspeca pluvego,
 tamen kio alte staras hodiaŭ kiel Monto Uralo
 ne estas amasigita fajro kaj ŝtalo,
 sed la provizo de sennombraj grenejoj.

Truman kaj Churchill, ili memoru
 ke Sovetia popolo estas ne atakebla,
 ekde la tago de Caricin
 ĝis hieraŭ, la tago de Stalingrad.
 Kiu ajn sovaĝa bruto
 kuraguŝi ĝin tuŝi iel,
 estos frakasita
 sub rebat'.

Memoru la militagentejn tiujn ĉi lecionojn,
 memoru ili pri Stalingrad,
 la urbo el sango kaj karno,
 la urbo el ŝtalo,
 la urbo heroo
 kun la tiea
 heroo defendantaro!

La tieaj herooj defendantoj jam hejmeniris
 demetinte milituniformon.
 Majoro Sabulov ne mortis,
 sed revenis kun la resaniĝinta Anja
 kaj instruas historion en gimnazio.

Kiam la luno grimpas super arbobintojn,
 tra strato lamplume banita,
 ili iras brakon ĉe brako,
 por viziti Baletan Teatron
 ĉe la prezentado de "Cigna Lago".
 La akvo de Volga fluas senĉese.
 Ĉi estu atestanto de ĉio ĉi tio.
 Stahanova heroo
 ekprenante pafilon
 jam estis defendanto de Stalingrad.



anoj de Junula Gvardio
 antaŭ la germanaj maŝinapafiloj
 morton akceptis aplombe kantante "Internacion".
 Kiam ekvenis paco,
 oni tuj dediĉis sin al urba rekonstruad'.
 Aŭskultas popolanoj de la tuta mondo
 la bruon venantan el Sovetio.
 Tio estas melodio de fabrikaj motoroj,
 kaj en kolhozoj ruligantaj traktoroj.
 Estas la popolo kiu pri nova vivo kantas,
 kaj Volga kiu al paco vokantas.

Paco estu donata al laboremaj popolanoj,
 al Volga
 kaj ĉiu loko kiun ĝi trakuras:
 Paco estu donata al la hidroelektra stacio
 de Kuibiŝev kaj Stalingrad!
 Paco estu donata al varmo,
 al lumo,
 al urbo kaj kamparo,
 al vero,
 al belo,
 al bono de la tuta homaro!

V

Ho! hodiaŭ estis nova stimulo por mi,
 Kiam mi legis radio-informon el Moskvo.
 Mi preskaŭ kuris sur la straton
 kaj laŭte kriis al la nokta urbo
 por veki ĉiujn
 kiuj dolĉe dormis post laciga labortago,
 ke ili eksciu la novaĵon
 pri Dnepra hidroelektra stacio
 pri Ukraina kaj Krimea kanaloj,
 kaj pri la konstruaĵo de irigacio.
 Ili ĝojos same kiel mi,
 ĉar la ĉi tieaj popolanoj
 jam lasis ĉian maldolĉon al historio,
 kaj dediĉas ŝviton kaj kreadon al la estonteco;
 ĉi tie ni 470.000.000 homoj
 ankaŭ kun sinforĝesemo de bolŝeviko
 konstruadas la estonton de sia juna respubliko.

Tremu antaŭ ni la malamikoj,
 kaj aplaudu por ni amikoj!
 Sur nia tero
 progresas eventoj senprecedencaj.
 Antaŭ unu jaro la naskiĝo de la popola res-
 publiko
 anoncis jam la bankroton en Orienta Azio
 de la intrigoj militagentaj.
 Bonvenigas pacamaj popoloj
 la kvaronon de la tutmonda fratara
 kun vivuoj kaj floroj.

Mia patrolando
 estas kiel leviganta suno
 kun radianta flumo.
 Mi amas lin, mia patrolando,
 malfaciloplena,
 tamen tiel bela,
 kun persepektivaj vastaj kiel junulo.
 La suno patrolanda estas tiel varma
 ĝuste ĉar la pasinta nokto estis
 fantomsvarma.
 La popolo patrolanda hodiaŭ ĝojas elkore
 ĝuste ĉar hieraŭ ili
 suferis dolore.

En mia hejmlando
 inundon sekvis sekeco.
 Kampanoj manĝis Kuanjin5-teron
 kiam elĉerpigis arboŝelo,
 kaj poste kadavron de frato
 kiu mortis je malsato
 kiam mankis al ili eĉ Kuanjin-tero.
 Grandaj knabinoj ne havante pantalonon
 vendis sian virgecon por funto da terpomo.
 Maljunuloj ne havis ĉerkon post sia morto.
 Junuloj migradis el kamparo al urbo,
 kaj de urbo al la marbordo,
 post tiam sub la nomo de "porkidoj",
 pogrande en kvaraklasaj kajutoj
 de ŝipoj kun Usona aŭ angla flago,

